




REDAKCIO:
PRAHA II. DITTRICHOVA UL. 7. BOHEMUJO.
ED. KÜHNL.

3. VIII. **BOHEMA REVUO ESPERANTISTA.** **1914.**

Cena: 30 hal.

Nepovažujeme za povinnost odpovídati na dotazy, k nimž nebyla přiložena známka na odpověď.

ČASOPIS ČESKÝCH ESPERANTISTŮ
BOHEMA REVUO ESPERANTISTA

Kun literatura aldono

LEGOLIBRO DE BOHEMAJ ESPERANTISTOJ

Oficiala organo de bohemaj Esperantistoj kaj de CENTRA ASOCIO BOHEMA UNIO ESPERANTISTA (B. U. E.)

(OFICEJO: PRAHA II., VODIČKOVA ULICE 38.)

Vychází 10krát ročně (kromě prázdnin).

Redakce vyhražuje si právo upraviti články pro tisk a vrací netištěné rukopisy, byla-li přiložena známka; práce původní mají přednost.

Předplatné v Rakousku 3 K, pro cizinu Fr. 3·75 = $1^{1}/_{2}$ Sm. Účet pošt. spoř. 93.281.

(Prosíme o adresy přátel Esperanta, kterým bychom mohli zaslati s úspěchem ukázkové číslo.)

Aperas dekfoje en jaro (krom libertempo.)

La redakcio rezerav sal si la rajton aranĝi la artikolojn por preso kaj resendas manuskriptojn nepresitajn, se poŝtmarko estis almetita; artikoloj originalaj estas preferataj.

Abono en Aŭstrio 3 K, por la fremdlando Fr. 3·75 = $1^{1}/_{2}$ Sm.

Konto ĉe la Ĉekbanko Esperantista en London. (Filio: Dresden. Bankejo Arnhold.)

STRIKO:

Pro **striko** *en la presejoj — preskaŭ $^{1}/_{4}$-jara — ne povis aperi regule ĉiuj n-oj la nova jarkolekto 1914. Ni klopodos nun eldoni ĉion mankantan kiel eble plej baldaŭ. — Red.*

Stávka:

Poměry v tiskárně, kde po dobu téměř $^{1}/_{4}$ roku se nepracovalo z důvodů veřejnosti známých, zavinily, že i toto číslo vychází opozděně. Ačkoliv nelze pro nával práce v tiskárnách vysaditi nyní dvojčíslo, vynasnažíme se vydati další čísla tohoto ročníku dle možnosti nejdříve. Doufáme, že shovívaví přátelé nás omluvili. — Red.

E. KÜHNL - K. PROCHÁZKA:

SLOVNÍK ČESKO-ESPERANTSKÝ.

PRÁVĚ VYŠEL!

První česká učebnice Esperanta se stručným slovníčkem vyšla r. 1890, tedy tři roky po uveřejnění Zamenhofovy práce. — Ačkoliv od té doby uplynulo téměř celé čtvrtstoletí, postrádali čeští Esperantisté do dnešního dne pomůcky nad jiné důležité — podrobného slovníku česko-mezinárodního, který by se mohl svým rozsahem vyrovnati podobným dílům cizojazyčným. A přece získávalo Esperanto v našem národě půdu a horlivé stoupence, kteří byli přesvědčeni o jeho hodnotě. Bylo sice i několik takových jeho adeptů, kteří, nemohouce v prvních učebných pomůckách překlad toho neb onoho slova nalézti, nepátrali dále a — odsoudili Esperanto. Ti však, doufáme, poznají časem svůj omyl, až nahlédnou do učebných pomůcek dneška.

Na slovníku právě vydaném bylo pracováno po několik let. Materiál byl pečlivě sbírán při četbě vzorných děl, hlavně Zamenhofových a k jeho konečnému doplnění bylo použito všech větších slovníků esperantských. Práce ta postupovala velmi zvolna a vyžadovala při součinnosti několika přátel největší opatrnosti a péče, neboť bylo stavěno od základu, bez jakéhokoliv vzoru, o který by bylo lze se opříti. Časté doplňky dokonce zavinily, že bylo nutno celý sebraný materiál opsati a znovu zpracovati, při čemž stále ještě nemohli jsme stanoviti rozsah díla. A když byl rukopis odevzdán tiskárně, brzy před ukončením tisku — zdržela stávka očekávaný slovník o čtvrt roku. Konečně však dosažena poslední strana a v několika dnech po vytištění posledního archu rozeslali jsme již vkusně vázané exempláře do českého světa. Posudky, které nám byly od té doby zaslány, jsou nám lichotivým důkazem, že naše dílo došlo ocenění a vlídného přijetí. Téměř ve všech poukazuje se na to, že slovník stane se nejen vzpruhou k horlivějšímu studiu Esperanta, ale že bude také pádným důkazem v ruce našich stoupenců, kteří stále ještě mají příležitost přesvědčovati zatvrzelou veřejnost o praktické ceně Esperanta a o jeho vnitřní hodnotě po stránce jazykové. Vycházejí-li takovéto knihy, jest jisto, že Esperanto neupadá!"

Slovník jest tištěn na tenkém, ale pevném papíru, tak že nezabírá mnoho místa a může býti pohodlně nošen v kapse (váží 250 gr.). Na 288 stranách podává překlady **více než 25.000 slov.** *Cena K 3·60 (se slevou pouze členům spolků B. U. E.). Do komisse se nezasílá.*

Žádný český Esperantista nemůže tohoto díla postrádati! (Vyžádejte si ukázku ze slovníku a slož. list u red. Č. Č. E.).

Poznámka. Česko-esp. slovník s proloženými bílými listy o 1 K dražší. Týž s indexem (abecedou po straně) rovněž o 1 K dražší. Týž proložený a s indexem o 2 K dražší.

MEZAZIAJ FUMANTOJ DE OPIO.

(*Por „Právo Lidu“ skribis Jar. Malý.*)

Oni flaras ian specialan, karakterizan odoron. Longa, al koridoro simila ĉambro estas malluma. Sebaj kandeloj, lokitaj en angulo de la argilaj muroj apenaŭ lumigas peceton da plafono, tio estas kelke da fulgokovritaj traboj kaj tufoj da kano, en kiuj de tempo al tempo ekbruetas lacerto aŭ ombro de karakurta (venena araneo). Argila planko, kovrita per kana mato kaj kamelhara tapiŝo, dronas en mallumo, el kiu intermite eksonas ronkado, rido, ĝemoj aŭ nekomprenebla murmurado. Kelke da paŝoj antaŭ ni staras negranda tabureto kaj sur ĝi simpla glaso en kiu lumas flameto kiel eterna lampeto. Super ĝi nigriĝas ia lada objekto. Sur la maldekstra flanko oni vidas kelke da longaj, kvarangulaj makuloj, kiuj lumas per malintensiva, blueta, fosforeska lumo. Ĝi estas fenestroj, tra kies tabuletoj provizitaj per grasumita papero anstataŭ per vitro penetras brilo de steloj kaj lumo de somera nokto. La pordo estas ŝlosfermita, kvankam estas ekstere pli multe ol 25 gradoj laŭ C. Apud ĝi sidas, simila al gardhundo, dika indiĝeno.

Ni estas en „teriak-ĥan“, la mezazia fumejo de opio.

Opio estis alportita en la mezan Azion je fino de la XII. jarcento dum regado de la persaj nobeloj, kies kortego senmezure ŝatis ĝin fumi. La opion fumis ĥan, altranguloj, komencis fumi ĝin la regatoj. Estis starigita leĝo. Per ĝi oni severe malpermesadis al ĉiu regato fumi opion, ne pro tio, ĉar tio estas kutimo neordinare danĝera, sed pro tio, ĉar la popolo ne havas rajton dolĉigi al si la vivon kiel la reganto, imiti sian surteran dion. La popolo fumis ankoraŭ pli multe ol antaŭe. Ili estis monpunataj, batataj, malliberigataj, ekzekutataj, sed ili fumis.

La uzado de opio aŭ „teriak“ ankoraŭ pligrandiĝis, kiam la angla registaro, kiu ĉion konsideras sole laŭ komerca vidpunkto, komencis en grandega kvanto eksportadi tiun ĉi fabrikajon al Afganistano, de kie ĝi pluen vastiĝadis al Buĥaro kaj Turkestano. Sekve de tiel granda importo la prezoj de opio malaltiĝis kaj poste fariĝis tiu ĉi veneno havebla eĉ por la plej malriĉaj.

La malbona moro vastiĝadis tiel rapide, ke la afganistana emiro Abduraĥman estis devigita starigi novajn, ankoraŭ pli severajn leĝojn, laŭ kiuj estis ĉiu fumanto senescepte senkapigota.

La leĝoj estis diskonigitaj, la ekzekutistoj laciĝadis de laboro kaj la popolo — fumis. Eĉ timo antaŭ la morto ne devigis la opiofumantojn, ke ili forlasu tiun ĉi malbonan kutimon; male, ĝi ankoraŭ helpadis ĝian disvastigon.

Opio estis kaj estas fumata ĝis hodiaŭ.

La buĥara registaro ne zorgas multe pri la fumantoj, estante kontenta per la grandaj impostoj el opio. Per tio ĝi kompreneble

nemalmulte helpas ĝian vastigadon kaj kulturadon. En la orienta kaj suda Buĥara grandiĝas la papavaj kampoj ĉiujare. Opio estas fabrikata, kiel konate, el papavo. Tuj, kiam la kapsuloj maturiĝas, ektranĉas ilin la indiĝenoj kaj kolektas la elfluantan, laktosimilan fluidajon en tasetojn, el kiuj ili transverŝas ĝin en kantubetojn, kie ĝi firmiĝas. La firma opio venas en formo de malhela cinambruna materio en la komercon. Oni ĝin fumas aŭ, kiel estas kutime en Persujo, maĉas miksitan kun diversaj aromaj substancoj. Memkompreneble, la ĉefaj klientoj kaj aĉentantoj de opio estas posedantoj de opiofumejoj aŭ „teriak-ĥanoj", en kiu ni jus troviĝas.

Sed aŭdu! Iu frapas la pordon! Dufoje sinsekve po du frapoj kun meza paŭzo tiom longa, ke vi povus diri: Ne estas dio krom dio, kaj Mohameto lia profeto. Jen la ŝiboleto, konata de ĉiuj „teriakeŝoj" (fumantoj).

La pordo malfermiĝas. Stelriĉa ĉielo ekrigardis en la malluman nestaĉon. Oni rimarkis kolonaron de „ajvan" (speco de verando) kaj kvarangulan korton verdantan de alta kanabo. Per kanabo semita korto estas sekreta signo de fumejoj. Sekreta pro tio, ĉar la rusa registaro proklamis sufiĉe severajn leĝojn, kiuj celis ekstermi la kutimon el limoj de la rusa Turkestano. Kiel ĝi sukcesas, oni vidas laŭ tio, ke en Samarkando mem estas pli multe ol 20 fumejoj.

Eniris altstatura, malgrasa Turkmeno kun ŝveldikaj lipoj kaj sangoplenigitaj okuloj. Ĉiujn la detalojn oni povis tre bone distingi, kiam la nova vizitanto sidiĝis al la tabureto, alitiris al si glaseton kun la flameto kaj ektenis super ĝi ladan objekton — specon de pipo, sur kies truohava, al pladeto simila kapo, brulis peceto da opio, granda kiel pizero.

La Turkmeno enspiradis la venenigan fumon plenblovigante kaj kunŝovante la vangojn, ĉe kio liaj okuloj kaj la akra nazo donis al li aspekton de raba birdo. Nepriskribebla, iom dolĉeta odoro vastiĝis tra la nestaĉo.

Subite la fumanto ruĝiĝis, forjetis la pipon kaj kun ridego renversiĝis. Poste li ekmurmuris ion nekompreneblan kaj profunde ekdormis.

Posedanto de la fumejo kun senkompata mieno prenis lin sub la brako kaj fortrenis kiel sakon da brano en la ombron, kie li apogis lin kontraŭ la muro. Unu el la dormantoj laŭte ekridis kvazaŭ pro ĝojo pri la nova kunulo. Kiel mi pli poste konvinkiĝis, en la ombro kuŝis aŭ en diversaj pozoj sidis pli multe ol dek senmovaj figuroj, kunigitaj per komuna profunda dormo, plena da fantomoj kaj iluzioj.

Laŭ aserto de kelkaj scienculoj povas la fumanto de opio travivi en kelke da sekundoj sian tutan pasintan vivon. La sonĝoj

estas kutime tre vivaj kaj agrablaj, estante vivigitaj de diversaj okazintaĵoj, amaventuroj ktp., en kiu la fumanto ludas la ĉefan rolon.

Ankaŭ nia Turkmeno dormis kaj sonĝis.

Pri kio li sonĝis? Pri kio alia, ol pri la paradizo de Mohameto!

Preter li fluas riveroj senodoraj; riveretoj da lakto kies gusto ne ŝanĝiĝas; torentoj da pura mielo . . . Ĉirkaŭ li kreskas fruktoj de diversa speco, donitaj al li de Sinjoro kiel pekpardono . . . li vivas en ĝardenoj de dolĉaĵo . . . li sidas sur benko ornamita per gemoj . . . eterne junaj sklavoj alportas al li vazojn, glasojn kaj kalikojn da trinkaĵo per kiu neniu ebriĝas kaj kiu neniun senkonsciigas . . . pladojn kun viando de birdoj, kiajn li ekdeziras. Grandokulaj virinoj kun nigraj pupiloj, kiuj similas al multekostaj perloj, repagas al li por la bonaj faroj . . . Li vivas meze de lotusoj sendornaj, meze de bananarboj, sur kiuj pendas vicoj da maturaj fruktoj, meze de branĉlarĝaj arboj . . .

Sonĝo elvokita per opio daŭras kvin ĝis ses horojn.

Poste sekvas granda malforteco, kapturniĝo, konvulsio en la muskoloj, unuvorte ĉiuj simptomoj de nerva difekto.

Opio tre rapide konsumas ĉiujn organojn kaj ŝanĝas tiel sanan homon je ruinaĵo, mortanta skeleto.

Inter la dormantoj aŭdiĝis brueto kaj lumon de la kandeloj ekombris iu figuro, kiu faris kelke da paŝoj kaj ekŝancelis. Mi ekvokis kontraŭ ĝi: Ho, aka, munda-kel! (Ho, frato venu al mi!) La vekita fumanto rigardis seninterese kaj ne moviĝis.

Mi refoje lin admonis: Venu kaj diru al mi, kion vi sonĝis. Jen, mi pagos al vi!

La vekiĝinto kvazaŭ ne aŭdus. Sendube li supozis, ke ĝi estas sole daŭrigo de lia sonĝo. Lia rigardo tion pruvis. Neniam mi vidis pli teruran rigardon. En ĝi mankis io, kio vidigas regon de homo super besto . . . Mankis en ĝi fajrero de prudento, rekono, juĝemo . .

Post iom da tempo mallevis la fumanto siajn okulojn, frotis per mano la vizaĝon kaj ekiris kontraŭ la pordo. Tie li haltis kvazaŭ meditante, ĉu li ion ne forgesis kaj poste li refoje falegis teren kaj ekronkis. La posedanto de la fumejo fortrenis lin laŭ kutima maniero en mallumon.

Venis al mi en la kapon komparo: „Demono de opio trenas sian viktimon en ombron de la malapero“.

Mi forlasis tiun malgajan lokon.

Stelplena nokto akompanis min sur la vojo al la hejmo, kaj la matenstelo komunikis saluton de baldaŭa tagiĝo. La aero odoris de roso kaj la naturo parolis: Ho, vi malsaĝa homaro, serĉanta

forgeson kaj feliĉegon en opio, morfio, nikotino, kokaino kaj en la ceteraj ĉiuspecaj narkotiloj, kiuj detruas la korpon kaj mortigas la animon. rigardu min, komprenu min, kaj mi dormigos vin per miaj belajoj kaj miraĵoj pli bone ol la opio, vi dormos dormon, kiu ne konsumas, sed fortigas la korpon, prezentu la impresiĝeman orelon kaj mi vibrigos vian timpanon per muziko de la kosmo, kiu forportos vin en la regnon de iluzioj, de forgeso kaj feliĉo, kie la animoj ne idiotiĝas, sed leviĝas!

Certe ĝi vokadis la samon ĉiutage al „teriakeŝoj" rapidantaj sin veneni per nova dozo da narkotilo: sed ili ne komprenis ĝin. La surda ne aŭdas kaj la blinda ne vidas.

PARIS — „SIRENO DE SEINE".

Estinte honorigita de la redakcio de nia Kongresa Gazeto per invito skribi kelke da linioj pri la impresoj, kiujn Parizo elvokas en memoro de vizitintoj, mi plezure plenumas tiun ĉi taskon kaj provos skizi miajn ideojn laŭ notoj faritaj post mia vojaĝo en la jaro 1903.

Ellerninte Esperanton, mi konsideras ĝin kiel la plej bonan helpilon dum la vojaĝoj tra la mondo. spertante ĉiujare la ĉiam krestantan utilon, kiun alportas la scio de tiu ĉi lingvo: jam antaŭ dekunu jaroj mi faris la unuan provon pri ĝia praktikeco, entreprenint la unuan vojaĝon okcidenten — tra Esperantujo. De post tiu tempo mi uzas ĉiujare la okazon viziti fremdlandon, precipe nun, kiam la tutmondaj kongresoj esperantistaj logas al tiaj ekskursoj. Celo de miaj vojaĝoj estis ĉiam sole eŭropaj ĉefurboj, sed — tion mi devas konfesi, precipe Parizo kaj Londono. La veran vivon en la stratoj, la riĉecon de la kolektoj, belecon de la konstruaĵoj kaj ĉion, kio estas unika en la mondo artisma, mi trovis en Parizo. Tial mi tiom deziras reviziti ĝin ĉe la plej baldaŭa okazo kaj ne por la lasta fojo. Estinte jam kvinfoje en la „luma urbo" super Sekvano, mi tiom pli sentas la deziron ĝin vidadi refoje. Kvankam mi ne meditus longe, ĉu mi estus kapabla skribi pri Parizo pli detalan informan artikolon, tamen mi preferas reveni al mia tasko kaj ĉerpi el la vojaĝnotoj, kiujn mi aludis pli supre.

. . . Kun amaso da alveturintaj pasaĝeroj mi troviĝis sur trotuaro antaŭ la stacidomo, meze de vivobolanta urbego. Dum mi sidis en la kupeo, miloj da pensoj persekutis unu la alian: kion viziti pli frue? kiun samideanon elserĉi unue? Sed jen — la surdiganta bruo dispelis la pensojn kaj mia atento tuj estas okupita per diversaj novaĵoj, el kiuj la plej frapanta estas la surstrata komerco. Sur la bulvardoj regas vigla vivo, kiu daŭras, kiel konate, ĝis malfrua nokto, aŭ pli bone, ĝis frua mateno; miloj da veturiloj

kaj centoble tiom da pasantoj ĉiam preterrapidas. La ornamoriĉaj konstruaĵoj altiras vian atenton kaj en la unua momento vi ne scias, kion pli frue kaj pli atente observi. Kvazaŭ oro kaj arĝento kuŝus tie sur la tero: kiom da mono oni elspezas por plibeligo de la urbo, por ke la „Sireno de Seine“ plaĉu! Kaj ĝi vere plaĉas! Tamen, kvankam la beleco de la urbo kaj la tumulto en la stratoj plene okupas la okulojn, resoniĝas la mallaŭta atestanto de la „denaciiĝo“ — la stomako. Mi ne volas blasfemi, sed nur konfesas sincere kaj humile al vi, miaj paciencaj legantoj, ke al patriotismo de stomako apartenas unu el plej eminentaj lokoj en kolekto de la plej diversaj patriotismoj. Kaj eĉ min devigis la internaj riproĉoj elserĉi unu el la kelkaj parizaj kuirejoj bohemaj. En flanka strato, kien la bruo de veturiloj kaj de pasantoj ne penetras, kvankam ne estas malproksima unu el la plej vivaj arterioj — *avenue de l'Opéra* — elkreskis kvazaŭ en fabelo ŝildo kun suskribo: „Český hostinec“. Tagmanĝo en tiu ĉi restoracio estis por mi kiel oazo por karavano. Kun novaj fortoj mi eliris denove en la vivajn stratojn Kien pli frue? La unuan tagon mi volas viziti la Eiffelturon por orienti min en la homa abelujo. La moderna babilona turo mem meritas pli multajn vortojn, sed tie ĉi mi devas kontentiĝi sole per cito de ĝia fama nomo. La suprenventuro bone instruas la vizitantojn pri situacio de Parizo, klare videbla ĝis kien la vido povas penetri tra nuboj limigantaj la malproksiman horizonton. Miloj da konstruaĵoj sur ebenaĵo — nur ĉe Montmartre ondiĝas kviete amaso da domoj. Grandegeco eĉ unuforma ne estas enuiga, precipe se ĝi estas beligata per impresigaj konturoj de la monumentaj konstruaĵoj. Oni rimarkas la majeston de *Louvre*, oni sentas respekton antaŭ la historia katedralo *Notre-Dame*, oni ekkonas en nuba ombro kupolojn de palaco *Mazarin*, kie „nemortemuloj“ (*immortels*: nomo de francaj Akademianoj) loĝas vivantaj, kaj tiujn de *Panthéon*, kie la samaj ripozas por eterne. Ĉi tiu rigardo fiksiĝas en memoro per trajtoj neforgeseblaj, per koloroj nedeviŝeblaj.

Kvazaŭ de teatra galerio mi rigardis en scenejon de granda prezentado de civilizacio kaj de kulturo: en la ekspoziciejon. Sed ŝajnas al mi, ke la ludo finiĝis — ke la kulisoj estas forigataj; nur disfosita tero kaj senordigitaj rubamasoj rememorigas pri beleco, kiun prezentadis kaskadoj de elektra palaco miksintaj sian ŝaŭmon kun lumo de sennombraj lampoj. De tempo al tempo eksonis krakado kaj baldaŭ sekvis surdiga, tondrosimila bruo kaŭzita de distaligataj feraj skeletoj de palacoj — siatempe admirataj. Ĉia gloro — kampa floro.

Vesperiĝas. Ĉiuflanke ekbrilas lumoj kaj la konduktoro atentigas pri la lasta okazo malsuprenveturi per lifto. La meditoj kaj revoj estas disrompitaj; post kelke da minutoj refoje mi estas en

brueganta, homoplena bulvardo, kie komenciĝas la vespera vivo, tiu vivo, kiu mem meritas, ke oni veturu Parizon.

K.

NIA BLINDULA KONGRESO.

Alvoko.

Permesu, karaj legantoj, ke mi ree turnu min al vi kun arda alvoko por la blinduloj.

Vi scias, kiel grava ŝajnas al mi tiu ĉi demando ne nur el problindula vidpunkto, sed ankaŭ el nia pure Esperanta.

Mia konvinko estas, ke kiam oni konstatos la praktike grandan utilecon alportatan de internacia lingvo al la tutmonda blindularo, oni ne plu povos nei ĝian utilecon por ĉiuj ajn homoj ankaŭ.

Tiun pruvon, sur la blindula kampo, mi tre dezirus montri fakte dum nia Deka Kongreso, en Parizo.

Sed ebla ĝi estos nur, se ĉiuj helpos al mi laŭ sia povo kaj forto.

Jam la franca Ministro de Internaj Aferoj bonvolis pruntedoni al ni senpage por la geblinduloj dormoĉambregojn en la *Nacia Instituto por junaj geblinduloj.*

Aliajn ĉambregojn ili havos por siaj laborkunsidoj, en kiuj ili diskutos ne la lingvon, ho ne! sed la praktikajn aferojn, kiuj ilin koncernas: enkonduko de Esperanto en iliajn lernejojn, blindulskribilaroj, internacia biblioteko, rabatoj por la poŝtsendado de punktreliefaj libroj, masaĝlernejoj, k. t. p.

Pri la nutrado dum la kongreso ni zorgis, kaj ĝi ankaŭ neniom kostos al niaj blindaj samideanoj.

Sur la francaj tervojoj, kiel ĉiuj kongresanoj, ili havos gravan rabaton, kaj de tiu ĉi flanko ankaŭ por ili ne tro granda estos la elspezo.

Fine le Kongresa Komitato prezentos al la neriĉaj inter ili, kiel jam okazis en Cambridge, diversajn tute ŝatindajn donacojn.

Aliparte oni nun organizas en Parizo grandan komitaton de sinjorinoj, esperantistinoj aŭ simple blindulamikinoj, el plej altaj kiel modestaj klasoj, sub esperEble eminenta patronado, kies celo estos alporti iom da distrajo, da ĝojo, da tutmonda lumo al la geblinduloj pere de nia kara internacia lingvo.

Tion nun mi petas de vi, amikoj, ke, se eble, vi starigu en via lando, en via urbo, en via grupo, samajn komitatojn, turnante vin ne nur al la koro kaj bonfaremo de la esperantistinoj, sed al tiu de ĉiuj blindulamikinoj, de ĉiuj virinoj.

Kun ilia helpo vi sukcesos sendube altiri la ĝeneralan atenton kaj ĝeneralan simpation je niaj esperantistaj blinduloj. —

plej grava profito ne nur por la blindularo, sed ankaŭ por Esperanto, — kaj vi plie trovos rimedon por sendi al Parizo lertan, esperante bone parolantan blindulon, kiun vi povos preni kun vi, kaj al kiu ĉiumaniere vi povos faciligi la veturadon. Tute necese estas, por ke utila kaj konvinka estu nia blindula kongreso, ke sufiĉe multaj diverslandaj kaj elokventaj estu en ĝi partoprenantoj.

Ne rifuzu, amikoj, vian kunlaboradon al la Blankbarbulo kaj pardonu lian certe ne tro oftan insistemon.

Th. Cart.

P.-S. — Sciiĝojn donos tre volonte: por ***Anglujo***: S-ro Adams, Plynlimmon Terrace, Hastings; S-ro P. O. Merrick, Elvetham, Shepperton; por ***Belgujo***: Frato Isidore, Woluwe-Bruxelles; por ***Bohemujo***: Prof. Macan, Klárov, 131, Praha III.,; por ***Danujo***: Prof. Wulff, Nyhavn, 34, Kopenhago; por ***Germanujo:*** Gesinjoroj Zapater-de-Chalmot, Neue Maastrichterstr. 15, Köln; por ***Rumanujo:*** S-ro Prezenti Levi, Vatra Luminoasa, Bukarest; por ***Svedujo***: S-ro H. Thilander, 12, Majorsgatan, Stockholm.

(El ***Esperanto***, 5. Marto: ***Bileto de Blankbarbulo***).

Protekta Komitato de Esperantistaj Blinduloj:

1. Okaze de l'Internacia Kongreso de Esperantistaj Blinduloj, kiu havos lokon en Parizo dum Aŭgusto 1914, estas fondita Protekta Komitato de Esperantistaj Blinduloj.

2. La celo de tiu ĉi komitato estas faciligi al la Blinduloj la lernadon de ***Esperanto***, kiu havigas al ili altvaloran distrajon, alportas al ili grandan ĝojon, plivastigante ilian horizonton ĝis la blinduloj de plej malproksimaj landoj kaj, jam nun, faras al ili grandan servon, tial ke, danke al ĝi, ili povas per reciprokaj sciiĝoj kunlabori internacie por la plibonigado de sia sorto.

3. La komitato konsistas nur el protektantaj sinjorinoj, de kiuj oni petas antaŭ ĉio kaj precipe la moralan apogon de ilia nomo kaj de ilia simpatio.

4. La titolo de ***Protektantino*** kunportas kun si neniun kotizajon, nek iun ajn specialan devon; sed ili interesiĝu pri la progreso de Esperanto en la tiel kortuŝanta mondo de la Blinduloj.

5. Tiun ĉi progreson oni konigos al la protektantaj sinjorinoj per paroladoj aŭ cirkuleroj.

La helpa Sekretariino:

Marie Larroche

55, rue de Vaugirard (Paris)

La Sekretario:

Th. Cart

12, rue Soufflot (Paris)

(Se vi havas konaton, kiu estas blindulo, faru al li donacon, abononte por li la revuon „Esperanta Ligilo“ ĉe prof. Cart kaj informu lin pri Esperanto!).

CIRKULEROJ.

„La germana metio. Dresden 1915" „Metio havas oran fundon" diras la proverbo. Aliflanke oni ofte aŭdas, ke la metio ĉiutage perdas je sia graveco pro la kresko de la industrio. Pruvi la unuecititan veron kaj kontraŭpruvi la duecititan diron celas la grandegstile aranĝota ekspozicio „La germana metio. Dresden 1915". Kaj tiu ĉi ekspozicio ne estos kiel la kutimaj metiaj ekspozicioj nur elmontro de metie fabrikitaj objektoj, sed en ĝi oni vive prezentos en plene funkciantaj metiejoj ĉiuspeca j la vivkapablecon kaj vivoforton de la metio, oni montros, kiamaniere la moderne organizita metio utiligas al si la maŝinojn kaj ĉiajn aliajn helpojn kaj oni pruvos ĉiel la progresojn faritajn de la germana metio per racia eduko de la junaj metiistoj per reciproka sinhelpo ktp. Tiu ĉi ekspozicio certe havos gravecon ne nur por germanaj, sed por ĉiulandaj metiistoj — tial ili jam nun estu kore invitataj por multenombra vizito. Detalojn oni petu de la administrejo de „Das Deutsche Handwerk". Dresden 1915, Dresden, An der Kreuzkirche 18, aŭ de la Del. de UEA. Johannes Karsch, Dresden-A., Dürerstrasse 15./III.

Laborista Ekspozicio en Praha 1915, kiun preparas la bohemslava social-demokrata partio, promesas esti riĉa kaj grandioza elmontro de la kultura, ekonomia kaj organiza matureco de la bohema laboristo; krom Bohemujo kaj Aŭstrio partoprenos en ĝi ankaŭ la aliaj ŝtatoj eŭropaj kaj amerikaj. La jaro 1915 certe altiros grandnombre la turistojn el ĉiuj landoj, ĉar samtempe oni festos la 500-jaran datrevenon de forbruligo de Majstro J. Hus, kies monumento estos en Praha malkovrita. Okaze de tiu ĉi signifoplena dato havos lokon olimpiado de la bohemaj laboristoj kaj de Sokol, fine universala kongreso de Libera Penso. — Esperante redaktitan cirkuleron de tiu ĉi enhavo dissendas la ekspozicia komitato en Praha (I. Hybernská ul. 7. S-o Fr. Weiner) al ĉiuj delegitoj de U. E. A. kun peto, ke ili publikigu ĝin nacilingve en la gazetoj naciaj. Laŭ spertoj ĝis nun faritaj en tiu ĉi direkto ni povas atendi, ke la klopodo de la komitato estos rekompencita per kontentiga rezultato.

Grava enketo pri Esperanto kaj la edukado. Oni scias, ke *Edinburgo*, en kiu urbo okazos la 11a Kongreso de Esperanto en 1915, estas grava centro por la edukado, unu el la plej gravaj edukaj centroj en la mondo.

Ĝi estas forta deziro de la *Edinburga Esperanto-Societo*, ke la kongreso okazonta en *Edinburgo* ricevu specialan, apartan karakteron, kaj ke oni kiel eble plej multe profitu la okazon, elmontri al la civilizita mondo la valoron de Esperanto kiel edukilo.

La kongreso en *Cambridge* en 1907 prezentis Esperanton al la angleparolantoj kiel novajon, kiel fakton: estas nia deziro, ke en Edinburgo ni reprezentu ĝin al angleparolantoj, post ok jaroj da sperto, kiel maturiĝintan aferon, kiu postulas eniron en la ordinaran programon de lernejoj.

Por pli perfekte elstudi la aferon, la *Edinburga Esperanto-Societo* starigis specialan Komitaton pri Edukado, kies membroj estas personoj havantaj praktikan sperton pri edukado kaj pri instruado de

Esperanto. Tiu komitato konsistas el: S-ro *J.-M. Warden*, L. K.; Dro *A.-E. Scougal*, L. L. D., eks-reĝa ĉefinspektoro de lernejoj por Skotlando; F-inoj *J. Baird* kaj *A.-M. Munro*, instruistinoj en publikaj lernejoj; S-ro *C.-T. Mac Gregor*, M. A. instruisto de latina lingvo en altgrada lernejo; S-o *James Pringle* kaj S-ro *W.-M. Page*.

Kun la aprobo de la Konstanta Komitato de la Kongresoj tiu speciala komitato redaktis cirkuleron kun demandaro, sendotan al ĉiuj grupoj esperantistaj en la mondo. — (Sekvas la teksto de tiu dokumento).

Se iu grupo eble ne ricevos la cirkuleron, oni bonvolu ĝin postuli de S-ro *W.-M. Page*. 31. Queen Street *Edinburgh* (Skotlando).

Z CELÉHO SVĚTA.

X. Světový kongres Esperantistů v Paříži (2.—10. srpna 1914). Do 25. května přihlásilo se již 2523 účastníků, z nichž 555 z Anglie, 325 z Německa, 166 z Rakouska, 141 ze Španěl, 84 z Ruska, 72 z Belgie, 46 ze Švýcar, 36 z Uher, 27 z Italie, 24 ze Spoj. států, 21 z Nizozemí, 20 z Dánska, 17 z Norska, 11 ze Švédska, 6 z Finska, po 4 z Australie, Bulharska, Chorvatska, Portug. a Rumunska, po 3 z Kanady, Argentiny, po 2 z Brazilie, Chille, Kuby, Uraquaje, a po 1 z Filipin, Gibraltaru, Japonska, Kapska, Peru, Portorika, Srbska, Sudanu, Turecka. — Z Francie došlo 914 přihlášek, z fr. kolonií 12. — Příspěvek kongresní 15 Fr. do 15. července (prodlouženo)! později 25 Fr. (Legitimace pro člena rodiny 10 Fr. resp. 20 Fr.). Kdo odvolá svou přihlášku před 31. červencem, obdrží příspěvek s 15% srážkou zpět. — „Kongresa gazeto“, jehož poslední čísla obsahují ve zvláštní příloze seznam jmen a adres přihlášených účastníků, přináší velmi praktické pokyny všem návštěvníkům Paříže; upozorňuje na místní zvyky v hotelích a restauracích, informuje o zařízení na nádražích a o dopravních prostředcích městských, poučuje o výslovnosti francouzštiny hosty neovládající tohoto jazyka a jest rádcem na četné dotazy čtenářů. Mimo jiné vypočítává, že sedmidenní pobyt v Paříži s výletem do Versailles nevyžaduje přes 100 K. K č. 6. jest přiložen ilustr. seznam výletů projektovaných po kongresu: do údolí Loiry (rozpočet na 2 dny III. tř. asi 50 Fr., na 4 dny 75 Fr.), do Normandie (33 Fr.), do Champagne (70 Fr.), do Limousin-Perigord (loňská cesta presid. Poincaré) pod protektorátem UEA (200 Fr.). — Zvláštní vlaky ke kongresu jsou již zajištěny z několika míst: z Berlína, Kolína/R, Mohuče, Chebu a z Anglie. — Ve prospěch kongresní pokladny bylo již odevzdáno 5054 franků; firma „Au Bon Marché“, kde založen před několika roky klub esperantský, věnovala 700 franků.

Společná cesta k X. Světovému kongresu Esperantistů do Paříže jest pořádána péčí klubu Esp. v Chebu. Súčastniti se mohou nejen Esperantisté ale i každý, kdo na př. za cílem soukromým chce navštíviti Paříž. Lze zvoliti buď slevu pouze pro jízdu drahou nebo — ve druhé skupině — přihlásiti se jako člen „karavany“, pro níž opatří se i ubytování a strava po celou jízdu i po dobu pobytu v Paříži, společné návštěvy památných míst atd. Tato druhá skupina přijímá i neesperantisty. Odjezd z Chebu dne 1. srpna ráno

návrat z Paříže 9. srpna večer, příjezd do Chebu dne 10. srpna. Cena lístku (tam a zpět) III. tř. 47·20 K, II. tř. 65 K, I. tř. 100 K. Jízdné se zaopatřením, s ubytováním, stravou, vstupným atd. III. tř. 160 K. II. tř. 204 K, I. tř. 260 K. Přihlášky nutno zaslati do 15. června na adresu: Karl Hell, b. žel. úředník v Chebu, Grabenstrasse 33. Program návštěvy význačných míst v Paříži nebude kollidovati s programem kongresním. Mimo těchto společných procházek budou navštíveny Verseilles, Sévres a při zpáteční cestě Remeš.

Čekbanko Esperantista, London, S. W. Merton Abbey. O účelu této nepostrádatelné pro Esperantisty platebny mluvili jsme již několikráte (viz. roč. VII. č. 1.). Její význam lze srovnati s významem poštovních spořitelen; ovšem obor její působnosti jest mnohem širší: kdežto pošt. spořitelny omezují se na určité země a ukládají účastníkům za povinnost míti stále alespoň 100 K na účtu, jest esperantská šeková banka ve spojení se všemi zeměmi celého světa a požaduje za sprostředkování svých služeb pouze nepatrného obnosu — K 2·40 ročně od každého účastníka, který žádá o otevření účtu! Za poslední čtyři roky vykazuje její činnost výsledky zcela uspokojivé: koncem r. 1910, kdy byla banka H. F. Hövelerem. autorem „klíčů“, založena, čítala 276 členů, kteří použili jejích služeb ve 4067 případech a poukázali na 90.000 K. Roku 1911 počet účastníků stoupl na 350 osob, platy na 193.000 Fr., r. 1912 pak na 470, platy na 184.000 Fr., r. 1913 již na 676 a platy na čtvrt millionu Fr. Dnes má u banky otevřený účet 780 firem a jednotlivců ze 320 měst a 43 zemí, kde mluví se 35 různými jazyky. Právě tak jako jedinou řečí pomocnou — Esperantem — provádějí se veškeré rozkazy bankovní, stejně i peněžní jednotkou jest pomocná jednotka 1 spesmil (K 2·40), známý všem našim čtenářům. Banka otevírá na všech esper. kongresech svou filiálku. — Považíme-li, jakou valnou měrou tato instituce usnadňuje práci každému, kdo má jakékoliv peněžní styky s cizinou musíme vysloviti zasloužený obdiv a dík jejímu zakladateli ale zároveň politování nad tím, že v některých zemích (v Čechách a v Rakousku vůbec) nedošla snaha Hövelerova náležitého ocenění kdežto v cizině namnoze již i firmy dosud neesperantské těží ze členství k prospěchu vlastnímu i svých zahraničních zákazníků. (Žádejte o bližší informace v Londýně neb u filiálek: Bankhaus Gebr. Arnhold v Drážďanech a A. Sacharov o Moskvě, Lubjanskij pr. 3.).

Několik úryvků ze zpráv cizích časopisů o stavu propagandy Esperanta. ***Francie***: V Grenoblu jest nyní 13 kursů, z nichž 10 ve školách pro 200 žáků. Městské rady v Châlon-s. S. a v Maconu udělily místním klubům subvence. V Paříži jest Esperantu vyučováno na 80 místech, většinou ve školách a v budovách městských. Ústav pro vyučování francouzštině v Touraine, navštěvovaný téměř výhradně cizinci, vydal své prospekty v Esperantu podobně jako již po několik let činí prázdninové kursy v Grenoblu a Dijonu. — ***Amerika***: K řadě spolků a svazů esperantských přibyl studentský svaz amerických Esperantistů, který vytkl si mezi jiným za cíl pracovati ve všech časopisech pro mládež na propagandě Esperanta. Již přes 100 delegátů světového svazu UEA jest roztroušeno ve Spojených Státech. — V ***Australii*** založeny opět tři nové kluby, v Melburnu pracují na propagandě již po několik roků dva spolky. — V ***Anglii*** stoupá počet spolků pravidelně každým měsícem. Příštím rokem bude se konati XI. kongres v Edinburgu a již nyní upsali angličtí Esperantisté přes 40.000 K ke hražení případných

výloh. — *Němečtí* Esperantisté mají na výstavě grafiky v Lipsku též svůj pavilon. Po vzoru saského státního ústavu pro šíření Esperanta byl nyní založen podobný ústav pro Bavorsko v Mnichově. Německý dělnický svaz vydal nyní seznam esperantských spolků dělnických, jichž jest založeno v 7 zemích již 97! — Městská rada v Seville ve *Španělsku* věnovala již po třetí po 600 K na propagandu Esperanta. Již ve třech městech lze čísti názvy ulic „ulice dra Zamenhofa". Katalánské „květinové hry", které jsou takořka svátkem národním a které poskytují básníkům příležitost utkati se na kolbišti před celým národem, opakují se v Barceloně každoročně od doby V. Esp. kongresu. Vítězům těchto literárních soutěží dostává se vedle květin i hojně cenných darů. — V *Budapešti* bylo vyučováno Esperantu koncem loňského roku v 16 kursech na 400 žáků. Letošního roku učí se mu již také na gymnasiích. — *Italští* Esperantisté připravují velkou manifestaci na světové výstavě v Janově, která přijala Esperanto do služeb propagandy. — Velmi potěšitelné jsou úspěchy Esperanta v *Rusku*, kde byl založen vedle četných stávajících klubů svaz lékařů-Esperantistů. — Časopis „Zeit" uveřejnil článek kap. Maliny o významu Esp. pro vzduchoplavbu, který vzbudil živý zájem mezi členstvem Mezinárodní vzduchoplavecké federace, jejíž sekce pracuje na této otázce. Na Nové obchodní akademii v VIII. okr. vyučuje se již druhým rokem Esperantu jako předmětu nepovinnému, ale žákům píše se známka na vysvědčení. Letos bylo zapsáno 42 posluchačů.

FELIETONO

La supermezura fervoreco de kelkaj propagandistoj ne ĉiam montriĝis kiel laŭdinda klopodo pri disvastigo de la ĝenerala uzado de Esperanto. La rezultato de ilia laboro pli ol unu fojon pruvas, ke ilia klopodo, kvankam plej sincera, ne renkontas laŭmeritan venkon. Aplikante ĉiun sian elokventecon, trudante tieldire sian servemon al persono, kiu elmontris antaŭ ili intereson pri Esperanto per unu sola vorto de kvazaŭa aprobo, la trofervoraj propagandistoj imagas, al si nepre vidi antaŭ si jam-jam Esperantiston. — Sed ĉu iliaj vortoj pri la cetere nedisputebla valoro de Esperanto ĉiam estas komprenotaj kun tia sincera kredo kiel ili estas dirataj? Ne, certe ne: „mil semoj perdiĝas". Kaj la kaŭzo? Tre simpla komparo helpos klarigi tion. Se vi rakontus hodiaŭ al reviviĝinta mezepokulo, ke oni povas nun flugi en aero, ke oni povas paroli je distanco, vidi tra la homa korpo, li miregos; li demandos, ĉu vi mem spertis tiajn miraklojn, ĉar vi tiel konvinke rakontas pri ili, sed li sendube post ĉiu via asertado respondos: eble. Kaj la sola informo, kiun li kredos, estas — faktoj, antaŭ kiuj li devos senrezone kliniĝi, ĉar li trovos, ke la evoluiĝanta homa intelekto progresas. Kaj nia nuntempa „nekredulo" estas sama: se li ne vidis faktojn, li ne aprobas ideon, pri kiu vi predikas per la plej flamaj vortoj kaj lia lasta respondo, post kiam li „pafkonsumis" kontraŭ vi ĉiujn argumentojn pri diversa prononc-

ado, pri manko de vortmaterialo k. t. p. — estos: „eble“. Se li estas eminentulo, tiam li eĉ ne konsideros grava kaj atentinda aferon, kiu ne naskiĝis en lia kapo aŭ pri kiu li ne estas informata el loko ankoraŭ pli alta ol kian li okupas. Sed estas ankoraŭ alia kaŭzo, pro kiu multaj suspekte aŭskultas la vortojn de propagandisto. Ĉu la praktika komercisto de la XX. jarcento, al kiu vi klarigas la utilon de Esperanto, ne demandos sin mem: kial li volas gajni min por sia ideo? Kial li perdas sian tempon (tempo estas ĉe komercisto mono!) kaj proponas al mi senpage tiom da servoj? La rezultato de via laboro, se vi dediĉis al ĝi eĉ horojn, se vi faris servojn plej valorajn, estas la sama kiel se vi estus sur la sama loko dirinta dekonon da viaj argumentoj, se vi estus perdinta eĉ ne unu pluan minuton per servoj, faritaj laŭ via opinio por altiri iun al Esperanto — sed fakte — kiel pruvas la plej baldaŭa estonteco, por vidi perdon de via tempo; la troservemo ne vekis sufiĉe da konfido kaj se vi per elspezo de multe da energio sole atentigis pri Esperanto, tio estas la sola rezultato — ne ekvivalenta kun via laboro, kiu, aliloke aplikita, estus povinta fari por nia afero pli multe da bono. Ofta sperto rajtigas nin konsili al la samideanoj en intereso de serioza propagando, ke ili memoru pri tio, ke trudante Esperanton kaj sian servemon al iu ajn aŭ devigante iun ĉiam kaj ripete aŭdi pri la afero, ili atingos pli eble malkomprenon kaj ilia propra fervoro malvarmiĝos, ĉar ili ne vidos la revatan grandpaŝan progresadon de sia ideo.

Kiu elmontras post la unua a l u d o pri Esperanto tiom da intereso, ke li mem demandas pri detalajoj kaj eĉ post tempo serĉas pluajn informojn, tiu certe fariĝos fervora adepto kaj daŭra partiano de Esperanto, ŝatante ĉiun instruon, kiun li mem elpetis ĉe vi.

SEN TITOLO.

Amerikaj ciferoj. La moderna Babilono New-York povas esti komprenata sole laŭ kelke da statistikaj ciferoj: Alveturas tien ĉiusekunde 4 fremduloj, ĉiun 42-an sekundon unu nova elmigranto post 52 sek. venas persona vagonaro, ĉiun 6-an minuton naskiĝas infano, 13-an okazas edziĝo, 42-an fondiĝas nova komercejo, 43-an elveturas vaporŝipo el haveno. Post ĉiu 51-a minuto finiĝas konstruado de nova domo. Ĉiutage 2341 vagonaroj transportas duonmilionon da vojaĝantoj kaj 350 homoj tie eklogas; dum la vespero oni manĝ- kaj trinkelspezas pli multe ol 6 milinojn da kronoj. Tiuj ĉi ciferoj estas same interesaj kiel maniero, kiun uzas la urba statistika oficejo por komprenigi grandecon de sia metropolo.

ESPERANTA MOVADO INTER BOHEMOJ.

PARTO OFICIALA.

Všem spolkům rozešle výbor B. U. E. v těchto dnech pololetní dotazníky a informace o pařížském kongresu.

Naše nové publikace: Slovník česko-esperantský právě vyšel (viz str. 33. a insert s ukázkou obsahu). Ve velmi vkusné úpravě tiskové byla vydána sbírka všech osmi kongresních řečí dr. L. L. Zamenhofa pod názvem **„Vortoj de Zamenhof"**, v níž zahrnut i jeho zajímavý dopis „O vzniku Esperanta", Deklarace o esperantismu a oběžník, jímž uvádí na pravou míru bezhlavé snahy několika rozkolníků v otázce pomocného jazyka. Kniha obsahuje 75 stran; cena 75 hal.; na lepším papíru 1 K (při 10 ex. sleva 10%) vypl. Doporučujeme nejen všem Esperantistům, aby obohatili svou knihovnu tímto cenným dílem, ale i všem kursům, aby zvolili je za četbu, vzornou jak po stránce obsahové tak i jazykové.

Propagační **dopisnice** s českým textem o Esperantu na adresní straně. (II. vyd.) Vypl. 40 ex. 30 h, 100 ex. 70 h. — Dopisnice (**pozvánky**) pro oznamování schůzí spolkových; zdarma za náhradu poštovného. — **Klíč Esperanta** III. vydání. Cena 5 haléřů (50 ex. 2 K).

Upozorňujeme tuto na nejlevnější vydání českého originálu **„Babičky"** Boženy Němcové, které vyšlo nákladem „Uměleckých snah" v Praze I. Ul. Kar. Světlé 31. Cena 30 hal. (Vydání Kočího-Beauforta na lepším papíru 50 hal.). V nejbližších číslech Č. Č. E. bude esperantský překlad tohoto cenného díla ukončen a doporučujeme všem přátelům, kteří chtějí se v Esperantu zdokonaliti, aby četli jej s českým originálem v ruce, neboť tak nejlépe pochopí ducha jazyka, v Esperantu tak logického a právě proto snadno osvojitelného. Přílohy časopisu nelze samy o sobě objednati. Cena za jeden úplný ročník (1907—1913) místo 3 K snížena na K 1·20. (Roč. I a II. jsou bez příloh).

La unua „Marseillaise" el bohema pulmo. Poutavá Arbesova črta ze života českého muzikanta vydaná dvakráte pod názvem: „První Marseillaisa z českých plic" vyšla v esperantském překladu Alex. Zahela v 8. a 9. čísle letošního ročníku „La Revuo".

Subvenci 50 K věnovala městská rada karlínská Ústř. Svazu B. U. E. na vydržování informační kanceláře.

E. K: en **České Budějovice** nomis prezidanton de B. U. E. s-on konsilanton Dr. V. Rosický sia honora membo kaj transdonis al li la 10./III. diplomon ĉe okazo de festa kunveno. Laŭmerite aludis en sia alparolo s-o faka instr. Svačina la gravan helpon, per kiu la honorigato subtenas nian aferon; kvankam kondamninda atako de iu individuo direktiĝis lastatempe kontraŭ la honesta kaj plej pura karaktero de la eminenta membro — fulmo frapas la plej altajn objektojn — tamen nenio estis ŝanĝita en la stato de la aferoj kaj la bohemaj Esperantistoj havis sole okazon por konvinkiĝi, kiel modelaj estas la pricipoj, sur kiuj bazas nia centro, gvidata de la honorinda sinjoro lerneja konsilanto. Samtempe kun la diplomo estis prezentita tre bela plaketo (portreto de Dr. Zamenhof) farita de s-o Fiala. Per siaj vortoj de danko s-o kons. Dr. Rosický esprimis ankaŭ la esperon, ke nenio povos malhelpi kunlaboron de ĉiuj honestuloj super la komuna ideo, sen atento pri socia, politika aŭ religia aparteneco. Post la festo sek-

vis amuzo kun deklamoj kaj teatrajo. — La klubo ekrilatis kun la societo „Antikva Budějovice“ kaj proponis al ĝi siajn servojn. – Belaj esp. vidajkartoj (5 specoj), eldonitaj je fino da la lasta jaro, baldaŭ estos elĉerpitaj. Nova karto (kastelo Hluboká) jus estis eldonita (12 h). Blinda samideanino, f-ino Hrubá, kiu aliĝis al la klubo, gajnis simpation de ĉiuj membroj pro sia aminda karaktero, scio de E. kaj sia lerteco.

En la klubo okazis nun ĉiusabate paroladoj pri diversaj temoj: Pri moroj en la antikva Romo (s-o F. K. Svačina), Kastelo Hluboká (f-ino Maťhová), La dua balkana milito (s-o ĉeflt. Hollegcha), Pri klubaj aferoj (s-o Krontl). Oni ekzercis frazojn laŭ la nova voraro, relegis Sherlock Holmes kaj komentariis la verkon de Kotzin. Laŭ permeso de la estraro malfermis la 24./IV. s-o ĉefleŭt. Hollegcha kurson en la loka garnizono por 132 soldatoj (87 boh., 45 germ.). La kurso okazas trifoje en la semajno en la kazerno.

Esper. K. en **Nymburk** partoprenas per sia delegito s-o Petrnoušek en la kunsidoj de la loka komitato por festo de M. J. Hus. Ankaŭ ĉe la pariza kongreso estos la klubo reprezentata per sia delegito s-o J. Šilhart. Laŭ la raportoj regule al ni sendataj pri la kunvenoj de la klubo ni vidas, ke la vivo en Nymburk eĉ dum somero ne malvigliĝas: kiel regula tago de la kunvenoj estis elektita jaŭdo. En N. loĝas nun nia amiko s-o St. Balík, unu el la kunfondintoj de nia movado en Bohemujo. Sekretario de la klubo estas elektita s-o Oldřich Panáček. — „Klub Českých Esp. ve **Vídni**“ sendas al ni regule artikolojn redaktatajn de s-o Dostál por la viena gazeto „Vídeňský Denník“. La 17./V. partoprenis la klubanoj ekskurson al Kreuzenstein. La gastoj, vizitontaj la urbon vendrede, salutu la klubon en la kunvenejo: XV. Národní Dům, Turnergasse 9. — **Rakovník**: S-o K. Kučera el Kněževes redaktas rubrikon pri E. ankaŭ en „Rakovnicko“; en „Rakovnické Listy“ aperis felietono trad el Esp.: Guteton da lakto. — E. K. en **Radvanice** (Silezio), kies ĝen. kunveno okazis la 8./III., havis 30 membrojn. Estis decidite elekti kvar distriktajn delegitojn, por la regionoj de Frýdek, Opava, Karvín kaj Ostrava. Inter la membroj estas Bohemoj kaj Poloj. — En **Loštice** (Moravio) fondiĝis la 3./V. klubo, kiu starigis vastan programon por sia laboro. Ni rekomendas tiun ĉi lokon kiel somerloĝejon al samideanoj, kiuj ŝatas la freŝan naturon kaj la okazon konversacii esperante. Esper. ilustr. kartoj el Loštice kaj Přerov baldaŭ aperos. Samideanoj el ĉirkaŭaĵo sendu sian adreson al s-o Boh. Straka en Loštice.

(Fine de parto oficiala).

LA VERO VENKAS.

(*Al glora Esp. Klubo en C. Budějovice dediĉis Dr. V. Rosický*).

Se la suneliron barus
Ĉiuj homoj sur la ter',
Super horizont' ekstarus
Tamen glora suna sfer'.

Kaj ĝi tamen bele brilus
Super mont', eben' kaj val',
Ĝia arda vang' utilus
Al la hom' kaj animal'.

Same sankta font' de vero
kaj honesta la afer'
Fine venkos sur la tero
Eĉ demonon de infer'.

Laŭ Bol. Jablonský.

Sekcio de klubo de Bohemaj Turistoj en **Klatovy**, kiu eldonis grandan afiŝon kun esperanta informo, preparas nun esp. „Gvidfolion tra Klatovy". — En **Beroun** estis malfermita tre sukcesa kurso pri E. post parolado de s-o Šídlo, kiun ĉeestis 300 gastoj. En la du kursoj enskribiĝis 80 kaj 120 lernantoj, instruataj de s-oj Ant. **Ráž** kaj Fr. Kraus. Sed bedaŭrindan sperton faris niaj viglaj amikoj: post tiel promesdona komenco stariĝis kontraŭ Esp. direktoro de la loka gimnazio, kiu, vidante en E. senutilan lingvaĵon, tiel rekomendis ĝin al siaj studentoj, ke ili prefere eksiĝis el la kursoj ol suferi venĝon. Alvoko adresita al tutmonda esperantistaro kaj klariganta tiun ĉi fakton, havigos sendube skribajn dokumentojn al la direktoro el ĉiuj landoj, por ke li konvinkiĝu pri sia eraro. Samideanoj bohemaj certe uzos ankaŭ tiun ĉi okazon por pruvi al li, ke E. estas inter ili konata kaj — ŝatata. — Novan kurson malfermis s-o O. Kočí en **Kladno**.

Por esperanta biblioteko de la **blindula instituto de Klár** kopiis per Braille'a sistemo s-o prof. Macan la verketon „Nigraj kirasuloj", kiu aperis en nia literatura aldono kaj la ĉapitrojn el „Orbis Pictus". — E. Klubo en Prostějov projektas kolekton por stipendio, kiu estas per konkurso donota al studento vizitonta la parizan kongreson.

BIBLIOGRAFIO.

Esp. Dokumentaro: *Naŭa Universala Kongreso de Esperanto en Bern 1913.* (Dokumentoj, protokoloj, nomaro de kongresanoj, kunvenoj de specialistoj). 163 pĝ. Prezo 3. Fr. Eld. Esp. Centra Oficejo, Paris 51., rue de Clichy. — *Kongresa Libro 1913 kun Gvidlibro tra Bern kaj Svislando.* 136 pĝ. Eld. Presejo Haller-Wagner, Bern. — *Oficiala Jarlibro 1914 de Universala Esp.-Asocio, Genève.* (Enciklopedieto, informoj pri U. E. A., adresaro de la delegitoj, informoj pri turismo kaj statistiko) 304 pĝ. Senpage por membroj de U. E. A. (Jara kotizajo K 2·40.). — Int. Mondliteraturo n-o 7.: A. Dygasinski: *Lupo, hundoj kaj homoj*; el pola l. trad. Br. Kuhl. 88 pĝ. Eld. Deutsche Esp. Buchhandlung in Leipzig. — K. Steier: *Das goldene Buch des Esperanto.* 221 pĝ. Prezo Mk. 1·20 (K 1·55 afr.). Vortfarado kun vortaroj esp.-germana kaj germ.-esp. (Formato 8 × 12.). — P. Christaller: *Kial Ido en rolo de internacia lingvo ne povas superi Esperanton?* 41. pĝ. Prezo K 0·60. Eld. Riga Stelo en Riga, Ruslando. Valora esp. broŝuro, pruvanta la sensignifan klopodon de Idistoj laŭ vidpunktoj teoria kaj praktika. — A. E. Styler: *En la Dolomitoj.* 47. pĝ. Prezo K 0·60. Eld. Brita Esp. Asocio, London W. C. 17. Hart str. Originalaj poemoj kaj prozajoj. — R. de Saussure: *La vort-teorio en Esperanto.* 78. pĝ. Eld. Univ. Esper. Librejo Genève, 10. rue de la Bourse.

Nia rusa samideano s-o Stojan, aŭtoro de ornitologia vortaro esperanta kaj eldoninto de enciklopedia rusa vortaro proponas krei per helpo de la tutmonda esperantistaro Universalan Slipan **Enciklopedion** — unuecan laŭ lingvo kaj formo. (Slipo: aparta, folio). Li opinias, ke lia ideo venkos kaj estos uzata en ĉiuj lingvoj de la mondo. Tiu ĉi sistemo similus la jam ekzistantan kolekton de esp. gvidfolioj. Aŭtoroj de komuninteresaj artikoloj presigus ilin sur samformataj folioj numerigataj en iu centra redaktejo. La slipoj estus vendeblaj po kelke da heleroj kaj kolekteblaj same kiel glumarkoj, poŝtkartoj ktp. Ne estus malgranda honoro por Esperanto unuafoje krei tian kolektivan verkon; tio havigus al ĝi renomon de progresema lingvo.

Por la Kongresanoj de la Deka. Oni scias, ke la Deka Kongreso organizas diversajn ekskursojn al la plej rimarkindaj vizitindajoj de la ĉirkaŭpariza regiono: Fontainebleau (3 ekskursoj) Versailles, la belaj Kasteloj de la bordoj de rivero Loire, k. t. p. Oni povas de nun ricevi beletajn albumojn de 24 ilustritaj poŝtkartoj pri tiuj diversaj vizitotaj monumentoj kaj pejzaĝoj kaj pri Parizo. Suficas sendi al S-o Ch. Verax, scienca fotografisto (35. Bd. Arago, Paris) po Sm. O. 450 (K 1·10) por ĉiu dezirata albumo, kaj oni tuj ilin ricevos afranke. Jen la albumoj jam pretaj: Parizo (2 albumoj); Kastelo de Fontainebleau; arbarego de Fontainebleau; Kasteloj de la bordoj de Loire; Kastelo de Chantilly; la Katedraloj de Francland; Ŝtonstatuoj de la katedralo N.-D. de Parizo; la Trezoro de N.-D. de Parizo; Muzeo de Louvre; muzeo de Luxembourg (skulptajoj kaj pentrajoj).

Aliparte aperis en la 28. s-o de Scienca Gazeto speciala artikolo pri la Arbarego de Fontainebleau; tiu ĉi artikolo klarigas la devenon de la tieaj ĥaosoj de rokoj kaj priskribas la plej ĉefajn kuriozajojn. Oni povas ricevi tiun numeron sendante du internaciajn respondkuponojn (aŭ francajn poŝtmarkojn) al la Redakcio de tiu gazeto, laŭ la sama adreso kiel supre.

S-o *O. Keči en Kladno* 983. aĉetas kaj por io ajn intŝŝ. ornamajn florojn, iliajn planterojn kaj semojn. Sendu prezaron!

KORESPONDANTOJ (*daŭrigo*):

En tiu ĉi rubriko estas publikigataj senpage adresoj de alilandaj samideanoj, kiuj serĉas korespondantojn inter Bohemoj. Atentigu pri tio viajn amikojn!

(*Mallongigoj*: int. = interŝanĝas; il. k. = ilustritaj kartoj; p. m. = poŝtmarkoj; bdf. = gluu la p. m. bildflanken; sgm. = sigel-m.):

*78. S-o Bazilo Nikiforov, *S. Peterburg*, Nevskij 110. „Esperanto". Rusujo (kor. pri aeroplanoj kaj lingvaj temoj). — *79. S-o Toivo Lehtonen, *Tampere*, Suomi, Hallituskatu 23. Finnlando (18-jara, il. k.). — *80. S-o Konst. Michin, stud. de geodezio *S. Peterburg*, Mitninskaja ul. 9 A. kv. 34. Rusujo (il. k., p. m., int. esper. gazetojn). — *81. S-o J. Berner, stud. *Lwów*, pl. Goluchowskich 8. Galicio (il. k., let., p. m.: bdf.). — *82. S-o S. Pšenicky, stud. ing. *Mittweida i. S.* Poste restante. Germanujo. (il. k., sgm.) — *83. S-o Wilhelm Wimmers, *Elberfeld*, v. Holz. 12. Germanujo. — *84. S-o R. Dehais. *Bolbec*, 14. rue Thiert, Francujo Seine Inf. — *85. S-o Th. Liébard, *Rouen*, 4. rue de Barcelone, Francujo (int. sgm.) — *86. F-ino Sonnet, *St. Pair-sur-Mer* „Les Rosiers", Francujo, Manche. (il. k., int. medalojn k. medalionojn). — *87. S-o Jos. Bőhm, *Budapest* Apaffyutca 40. X. ker. Hungarujo. (int. p. m.). — *88. S-o Georgo Fejeŝ, *Somberek-Baranya m* Hungarujo. — *89. S-o Szudi Bela, *Diósgyör-Vasgyár*, Gépészeti osztály. Hung. (il. k., p. m.). — *90 S-o Györi Nagy István, *Miskolcz*, Reményi ut. 4. Hung. (il. k., p. m.). — *91. S-o Simono Róth, *Ungvár*, Arpádvezir ut. 57. Hungarujo (kor. kun ĉiulandaj gestud. per. il. k.). — *92. S-o Joz. Veréb, *Csantavér* 10. Hung. — *93. S-o Eug. Rosenbaum, *Ungvár*, Széchenyi-pl. 3. Hung. (il. k.). — *94. S-o B. Sukonkin, *Sergiev Posad*, Moskva gub. Ruslando (il. k.; p. m.). — *95. S-o Jos. Karantbajvel, *Kiev*, Rus (kor. pri kolektoj botanika, zoologia k. a. int. il. k.). — *96. S-o Vlad. Ivanoviĉ Petraŝenj, *Morŝansk*, fabriko Aseerich. Rus. Tamborskoj gub. (dez. kor. kun ĥemiistoj). — *97. S-o J. G. Kuiters, *Haarlem*, Lange Veerstraat 7. Nederlando (il. k.). — *98. S-o André Gerard, Tonnerre, 9. rue de l'Hôpital, Francujo (kolor. il. k.. ĉiam resp.) — *99. S-o Johne Walter, instruisto, *Potschappel*, Dresdener str. 28. Saksujo. (kor. kun negermanaj instruistoj aŭ kongresanoj de la X. per let. aŭ il. k.). — *100. S-o René Lapize de Salleé, Société Générale, *Annonay*, Ardèche, Francujo. — *101. S-o Adam Bartosz, *Baltimore, M. d.* 513. S. Glover Str. U. S. Amer. (let., il. k.). — *102. S-o Ruy Guim-es, *Rio de Janeiro*, 61. M. de Olinda, Botafogo. Brazilio. (int. glm.). — *103. S-o Walter Lippmann, *Leipzig*, Tauchaerstr. 10. III. Germanujo (kor. pri abstinenco, judaj problemoj, buddismo, japana, ĥina, hinda aŭ germ. liter., sava armeo, mondlingvaj problemoj). — *104. S-o Hans Meier, gimnaziano, *Regensburg*, Bavarujo, Stahlzwingerweg 10. (int. p. m., esp. jurnalojn). — *105. S-o Albert Fraas, *Regensburg III.* Poste rest. (il. k.).

Eldonanto: **Ed. Kühnl.**

Presejo de Národní tiskárna a nakladatelství spol. s r. o. v Praze.